

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№ 5

Majo, 2017

Karaj niaj Legantoj, jen venis la tempo por prepari kaj aperigi al via atento la 150-an numeron de nia bulteno. Fakte, aperis multaj centoj da la bultennumeroj en la glora, la plej granda urbo de la centra Usono (laŭ nombrado, ĝi estas la plej granda urbo de la Mezo, post orienta Nov-Jorko kaj okcidenta Anĝelurbo). La ĉi historio komenciĝis antaŭ pli ol 13 jaroj, kiam tiama vic-prezidanto (nuna prezidanto) proponis al mi eldoni la bultenon de nia E-societo. Februare de 2004 mi ĵus venis al Usono. Antaŭ tio, mi estis prezidanto de la Ukraina E-Asocio ege potenca Londona E-klubo. Tiam de la E-societo, konatiĝis kun multaj Oktobro 2004 Leszek Kordylewski provu eldoni nian E-bultenon, kiun antaŭ kelkaj jaroj, nur kelkfoje". "Bone, kiu rezultigis en 150 senhaltaj, Hodiaŭ mi volas danki al ĉiuj ĉefaj kunlabora(i)ntoj, kiel d-ro Les Kordylewski, d-ro Puramo Ĉong, Karlo Gunn kaj multaj-multaj aliaj, sen kontribuo de kies la apero de ĉi numero estus malebla. Denove – DANKON!

150

(1993-1997), poste – membro de (Feb. 2004) mi tuj vizitis kunsidon lokaj gesamideanoj. Fine de la diris: "Viktoro, vi estas sperta E-isto, mi, kun helpo de mia filo, aperigis mi provos" – estis mia respondo, seninterrompaj monataj numeroj.

De hodiaŭa numero ni publikigos historiajn kaj literaturajn aldonaĵojn. Dankon al la unua nia kontribuanto Bill Chapman el Kimrujo. Sanon kaj sukcesojn al vi!

Mi ne enkondukas vin, kiel kutime, en la enhavon de la ĉi jubilea numero, vi mem eksentos ĉion post unu minuto... Ek!

–Viktoro-Redaktoro

Karaj Legantoj de "Saluton!",

Estas por mi vera plezuro sendi al vi ĉi tiujn kelkajn salut-vortojn! Mi ne scias la kialon, sed la Esperanto-societo de Ŝikago estas la usona Esperanto-grupo, kies agadon mi iom sekvas tra la jaroj. Tio ne estas mia merito, sed merito de la komunikemo de via grupo.



Daŭrigu vian agadon, ĉar la internacia Esperanto-movado bezonas ĝin. La eŭropaj esperantistoj pensas, ke eble la venko de Esperanto dependas de Bruselo, de la emo de la Eŭropa Unio akcepti ĝin, sed, laŭ mi, ili revas. Ankoraŭ nuntempe la forta lando en la mondo estas Usono, kaj ĉio, kio okazas en Usono, estas abunde republikigata tra la mondo. Tio signifas, ke forta movado en Usono influas la tutan mondon.

Kompreneble Universala Esperanto-Asocio devas zorgi pri tio, ke la movado fortiĝu en ĉi lando, kaj tio bonŝance estas okazanta.

Sed Usono havas apartan signifon por la mondo kaj ankaŭ la usona Esperanto-movado havas ĝin. Do, intensigu kaj fortigu vian agadon por la bono de ni ĉiuj.

Amike, d-ro Renato Corsetti, Prezidanto de UEA

Tempo pasas rapide. Subite ni festas la jubileon de nia bulteno. Dum oni povus trakti la regulan seninterrompan aperadon de "Saluton!" kiel kutiman aferon, nun venas la momento de konsidero kiel grandegan laboron faras nia Redakcio. Dum jaroj estis interese observi la evoluon de "Saluton!", ekde modesta permane kopiata papera nigrablanka, ĝis la hodiaŭa plenkolora cifereca, riĉe ilustrata. Laŭinde la enhavo estas varia, ne nur donas informojn pri nia loka agado, sed ofte rilatas al la eksteraj esperantaj kaj ĝeneralaj kulturaj aferoj. Oni eĉ foj-de-foje legas en ĝi poezion. Verdire, nia "Saluton!" ŝajnas esti monata mini-revuo. Ĉio danke al la senlaca laboro de nia kara Redakcio, al kiu ni ŝuldas multajn sincerajn dankojn kaj gratulojn. Dankon Viktoro-Redaktoro pro via sindediĉo kaj zorgemo! Dankon Karlo, pro la altkvalita teknika helpo, pro kiu "Saluton" aperas tiel alloga, kaj povas esti legata surrete. Pliajn dankojn al Viktoro, kiu zorgas pri dissendado de nia bulteno al la esperantistaro, pro kio nia modesta Societo famiĝis tutmonde. Ni esperu, ke nia bulteno daŭrigos sukcese servi kiel kroniko de la agado de Ŝikago Esperanto-Societo, kaj ankaŭ daŭre servi kiel interesa legaĵo por ĉiuj.

–D-ro Les Kordylewski, Prezidanto de ESdŜ

Pasis jam 100 Jaroj dum kiam Vi nur en niaj Koroj

Laste, inter la 28-a kaj 30-a de aprilo en Varsovio, Pollando, iniciate de la Varsovia Filio de Pola E-Asocio sekvis Solena Konferenco okaze de la 100-a mortodatreveno de Ludoviko L. Zamenhof. Ĝia celo estis simpla – renkontiĝi por rememori la Majstron kaj danki al li pro Esperanto. Tiamaniere, samtempe, malfermita estis la Zamenhof-jaro, akceptita de Unesco, de la pola parlamento kaj de la polaj urboj Słupsk kaj Bjalistoko. La evento evidentiĝis ne nur riĉa programe sed ankaŭ kortuŝa. En okuloj de la partoprenintoj aperis eĉ larmoj dum kiam kolektiĝintaj ĉirkaŭ la monumento-tombo laŭlegataj estis ĉiuj poemoj de Zamenhof kaj ĉe la fino, post deklamo de “La Espero”, Georgo Handzlik ekkantis la konatan bardan kanton... “Mi volas danki vin, s-ro Ludoviko”. La Solenan Konferencon grave pliriĉigis paroladoj de Mark Fettes, prezidanto de UEA, Ulrich Lins, historiisto, aŭtoro de verko “La danĝera lingvo” kaj de Margareta Zaleski-Zamenhof, pranepino de la Majstro. Krome, pri rilataj al Esperanto taskoj de Unesco rakontis Barbara Despines, riĉan historian enhavon de la zamenhofaj memoraĵoj en la viena Esperanto-muzeo prezentis Bernhard Tuidar kaj ĉion tion substrekis arte altkvalita piana koncerto de Rinko Kobayashi, artistino premiita en la internacia Chopin-konkurso. La Solena Konferenco konsistis kompreneble ne nur de tiuj kelkaj menciitaj festaj paroladoj. Valoras rememori ankaŭ la oficialajn salutojn de la reprezentantino de la Pola Parlamento kaj la Varsovia Vojevodio. Krom la ena programo proponita estis ankaŭ la ekstera, ekskursoj en urbocentro de Varsovio, vizito en muzeo de la Polaj Judoj „Polin” kaj en muzeo de la Varsovia Insurekcio “Muzeum Powstania Warszawskiego”. Menciinta estas ankaŭ multlingva surstrata laŭlegado de libro „La Zamenhof-strato” de Roman Dobrzyński, kiu okazis en la lokoj priskribitaj en la libro kaj kiun gvidis la aŭtoro de la libro mem. Malfacilas en eta informo rakonti pri ĉio. Pli da informoj, ankaŭ fotojn, troveblas en la retejo de la Pola E-Asocio, multaj tuj aperis ĉe Fejsbuko. Krome, kadre de la 123-a elsendo de Varsovia Vento, aŭskulteblos baldaŭ la rememora sonraporto, kiun ilustras ni pere de filmeto el la ceremonio ĉe la ludovika monumento-tombo. Laŭ aliĝoj la Solenan Konferencon partoprenis ĉirkaŭ 160 esperantistoj el multaj landoj, tamen alvenis multe pli ol 200, ĉar multaj varsoviaj ne bezonis speciale aliĝi. Resume la Solena Konferenco estis vere solena. Dum tiuj ĉi tri tagoj klare rimarkebla estis kortuŝa etoso kaj sentebla vera unueco de la esperantistaj koroj, speciale dum momentoj danki al Ludoviko pro la lingvo, kiu spite al historiaj malfaciligoj ligas nin ĝis nun.



– Irek Bobrzak, Varsovia Vento

P.S. La mención pri la Solena Konferenco en Varsovio sendube pligravigas ankaŭ solena kaj ronda, ĉar 150-a numera, eldono de via revuo “Saluton!”. Akceptu de ni do, de la varsovia esperantistaro el la Varsovia Filio de PEA kaj el Varsovia Vento, sincerajn gratulojn pro via pacienca agado! Ne gravas ja kie ni loĝas – diris la pranepino de Ludoviko, s-ino Margareta Zaleski-Zamenhof – gravas, ke ĉiuj ni, vi kaj mi, apartenas al unu granda familio, kiun iam kuraĝe fondis mia praavo.

***** **Georgo Handzlik** *****

Mi volas danki vin, sinjoro Ludoviko,
Mi volas danki vin per ĉi tiu kant',
Mi volas danki vin, maljuna kuracisto,
Mi volas danki vin, Doktoro Esperant'.

Pro “Verda koro” de Julio,
“Streĉita kord” de Koloman',
Pro la kongreso varsovia,
Pro renkontiĝo kun japan'.



Pro la amikoj en Francio,
El Germanio kaj Kanad',
El Itali' kaj Hungario,
Pro belulin' el Leningrad'.

Pro juna negro-komencanto,
Kortuŝa franca melodi',
Ĉar ĉio dank' al Esperanto,
Kaj ĉio, Majstro, dank' al vi!

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

NOVA LOKO

Venonta kunsido okazos 7:00-9:00pt laŭ en la Centra Biblioteko sur la 6-a (sesa) etaĝo norda stud-ĉambro: 400 S. State St., Ŝikago.

23an de Majo – 500-Jariĝo de Reformacio, Gvidas Hanso

(18an) 25an de Junio – Tradicia Somera Pikniko

25-an de Julio – pri Kaliforniaj Vitejoj Rakontas Araneo

22-an de Aŭgusto – UK en Seulo per Okuloj de S-no Leszek

Ĉu venas tempo por Esperanto en Eŭropo?

– Jean-Claude Juncker, prezidanto de la Eŭropa Komisiono, elpaŝante la 5-an de Majo en Florenca Palazzo Vecchio dum konferenco “La Stato de la Unio” – ĉiujara evento por eŭropaj eminentuloj, elektis liveri paroladon en la franca lingvo. Liaj komentoj ne plibonigos renovigadon de bariloj post vort-milito inter Bruselo kaj Londono koncerne intertraktado pri “Brexit”. Juncker diris, ke li elektis la francan, ĉar “malrapide, sed certe la angla estas perdanta gravecon en Eŭropo kaj Francio havas balotadon ĉi dimanĉe kaj mi volas, ke gefrancoj komprenu, kion mi diris pri la graveco de EU”. <http://www.politico.eu/article/jean-claude-juncker-english-is-losing-importance/>

– En Kijivo, ĉefurbo de Ukrainio, finiĝis eŭropa kantkonkurso “Eŭrovizio’2017”, kie la ĉefan premion gajnis kantisto el Portugalio (kie dum la tuta sia vivo loĝis en Usono) – Salvator Sobral, li kantis portugale. Dum la finala prezentado sonis kantoj en belarusa, cigana-hungara, franca, hispana, itala. Kiam estis anoncitaj rezultoj de la konkursoj, unu el portugalaj ĵurnalistoj ekkriis: “Do, venas tempo kanti nacilingve!”. Ĉu ankoraŭ unu protesto kontraŭ la angla?

Pioneers of Esperanto in Illinois

by Bill Chapman

Esperanto: an artificial international language based as far as possible on words common to the chief European languages. Merriam-Webster's Collegiate Dictionary, 11th Edition.

The international constructed language Esperanto was first introduced in 1887 by a linguist and medical doctor living in Poland, Dr. L.L. Zamenhof (1859-1917), and its first adepts lived in the then Russian Empire, but it soon began to gain adherents elsewhere. This year (2017) sees the 130th anniversary of the language and a century since the death of its founder.

The names, addresses and registration numbers of more than 30 early speakers of Esperanto in Illinois are found scattered throughout the *Adresaro de Esperantistoj* (directory of Esperantists) between 1892 and January 1909. Each individual is ascribed a unique number, which I do not reproduce here. Indeed, early users of the language frequently signed articles with that number alone, knowing that anyone wanting to contact them could easily find their address in the published *Adresaro*.

These listings contain occasional spelling errors because each individual filled in a pre-printed form in their own handwriting. *I reproduce the addresses exactly as they appear.* Here are the names of those Illinois pioneers of over a century ago.

Edition II Up to 13 January 1892

Maggie Cusak
96 Dearnborn Ave., Chicago, U.S. Ameriko

Leo M. Drake
91 Flournoy S. Chicago. U.S. Ameriko

Alice Kearns
86 Damen S. Chicago, U.S. Ameriko

Louise Turgeon
587 West Chicago Ave., Chicago. U.S. Ameriko

Lydia Young
511 Park Ave., Chicago, Ameriko

Edition XXII 14 January 1901 to 14 January 1902

Francis G. Morin
234 Ewing St., Chicago, Ill. U.S.A., Amerika

Esperanto translations


Ameriko	America
Doktoro	Doctor
F-ino	Miss
Fabriko	Factory
Ĥirurgo	Surgeon
Laboristo	Worker
S-ino	Mrs.

Edition XXIII 14 January 1902 to 14 January 1903

A. Gaylord Bramau, student
34 Walnut St, Chicago, Illinois
Unuigitaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko

Doktoro Denis Morin [Photo right]
258 Laflin-Street, Chicago, Illinois
Unuigitaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko

S-ino [Mrs.] Minnie Krieg Morin
234 Ewing Street, Chicago, Illinois
Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko



James Daněk, klerk
717 Alport Street, Chicago, Illinois. U.S. de Ameriko

Edition XXV 1 January 1904 to 1 January 1905

Miss Elise M. Burow
1772 Deming Place, Chicago, Illinois
Unuigitaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko

Edition XXVI 1 January 1905 to 1 January 1906

F-ino [Miss] Emma Schroder, 892 Milwaukee Av.,
Chicago, Unuig, Ŝt. Nord-Amerikaj

E. L. Robinson
202 South 12th St., Quincy, Ill. U.S. Ameriko

Edition XXVII 1 January 1906 to 1 January 1907

Charles Fröding, fabriklaboristo
1216 20th Avenue, Rockford, Ill. U. Ŝ. Ameriko

Carrie A. Bennett, Osteopathie Physician
Braun-Kiep Building
205 North Chicago Street, Joliet, Ill, U.S.A.

Eugene F. Mc Pike
1 Park Row, Room 607, Chicago (Ill), U.S.A.

W. B. Parmelee
926 N. 48th Ave., Chicago, ILL., U.S. Ameriko

F. E. Roberts
556-1 2nd Ave., Chicago, U.S. Ameriko

C. V. Cruse (ĥirurgo), Iola, Ill., U.S.A.

Edition XXVIII **1 January 1907 to 1 January 1908**

F-ino [Miss] A. E. Morse, Odell (Ill.). U.S.A.

Eugenet Pike, Chicago, Illinois, U.S. Amerika

Harry G. Blaine, A.M. MD.
125 North Dale Avenue, Chicago, Ohio, U.S.A.

S-ino [Mrs.] B. Levering
3251 Malden Street, Chicago (Ill.) U.S.A.

Benjamin Levering
1524 First National Bank Buildings, Chicago (Ill.), U.S.A.

F. J. Mc Mahon, 11810 Butler Street, Chicago, Ill., U.S.A.

Louis A. Kopecky
822 South Ashland Avenue, Chicago, Ill., U.S.A.

Luther R. Frame
1519 E. South Grand Ave., Springfield, Ill. U.S.A.

Edition XXIX **1 January 1908 to 1 January 1909**

Ninde, 24. The Spurling B., Elgin, Illinois. U.S.A.

Dr K. W. Milbican
Sheridan Road 1143, Chicago Ill. U.S.A.

Rev. T. V. Jakimowicz
1008 Milwaukee Av., Chicago, Ill. U.S.A.

Emma Wager, 71, Gifford St., Elgin, Ill. U.S.A.

F-ino [Miss] Emma Whitstruck
721 Center Street, Elgin, Ill. U.S.A.

Little is known about most of those listed here. Charles Fröding declared that he was a factory worker. One individual called himself “a clerk”. C.V. Cruse gave his occupation as “surgeon.” There are two other doctors— an osteopath and one reverend gentleman.

Arthur Baker was editor of *L’Amerika Esperantisto*, which was first published in Oklahoma City. The company was a specialized publisher and vendor of Esperanto materials

Illinois State Genealogical Society Quarterly Journal, Vol. 49, No. 1

and was dedicated to the promotion of Esperanto. Baker moved his company to Chicago (according to the July 1907 issue) because he saw Chicago as “the most American, and at the same time the most cosmopolitan of American cities.” Therefore, he believed it an ideal place to promote Esperanto as an international auxiliary language.

We know that a Professor Otto Haux Mayer held the diploma of the British Esperanto Association and was teaching the language at his home in Chicago in 1907.

There was a Chicago Esperanto Association which met monthly at the Great Northern Hotel, and Esperanto groups within the state came together to establish an Illinois Esperanto Federation in October 1907.

We have more to discover: Have minute books of these organizations survived? Did any of these enthusiasts pass on letters or postcards in the language to later generations?



For information on the language today, go to Esperanto-USA, a non-profit educational association at <https://www.esperanto-usa.org/>

Bill Chapman is researching his family history in England and Wales. He is Deputy Mayor of the medieval town of Conny in north Wales and a local magistrate / Justice of the Peace. He has a particular interest in sources of information on genealogy in languages other than English. Mr. Chapman can be reached at

patbillchapman@gmail.com